

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio, pri la centjareco de Ruĝa Kruco. Vi aŭdas la okan prelegon pri tiu temo.

Henry Dunant en Solferino restis pasiva spektanto ĝis la eksilento de la kanonoj. Dum la pasinta semajno mi legis al vi kelkajn el liaj dirojn. Vi tiel povis imagi la sintenon de la fondinto de Ruĝa Kruco dum la lukto kaj dum la terura nokto, kiu silentigis la batalantojn. Mi hodiaŭ prezentos al vi aliajn tekstojn el la libro *Rememoro de Solferino*, kiuj rilatas al la sufero de la vunditoj kaj al la agado de Dunant.

Aŭdante tiujn citaĵojn ni rememoru, ke se en Solferino pli ol kvardek mil vunditoj kuŝis sur la batalejo, poste, de 1859 ĝis hodiaŭ, okazis ankoraŭ miloj da aliaj Solferinoj, kie milionoj da aliaj homoj suferis la samajn kalvariojn. Ruĝa Kruco ne estis fondita nur por sekuri la viktimojn de hombuĉadoj, kiel multaj personoj bedaŭrinde kredas. Ĝi konstante aŭdigis la plendojn de tiuj viktimoj, por ke foje la homoj elektu pli homecan vojon por la solvo de siaj problemoj, ol perforton, kiu nur povas konduki la homaron de ruinoj al ruinoj. Unu jarcento ne sufiĉis por aŭdigi al la registaroj la kriojn de iliaj militvunditoj. Ĉu ne estas iom kaŭze de nia demisio ?

Henry Dunant konstatas la mankon de volontuloj kaj la mankon de kunordigo inter la sanitaraj helpoj. Pro tio li ekagas. Ni donu al li la vorton por havi bildon de la situacio en la urbetoj, kiuj ĉirkaŭas Solferinon.

*« La nombro de la transportoj de vunditoj fariĝas tiel grava, ke la administrantaro, loĝantaro kaj soldataro restintaj en Castiglione absolute ne kapablas por sufiĉi al tioma mizero. Akvo kaj nutraĵo abundas kaj tamen vunditoj mortas pro malsato kaj soifo, pansaĵoj abundas, sed ne la manoj por ilin meti sur la vundojn ; la plimulto de la armeaj kuracistoj forlasis la lokon por Cavriana, flegistoj mankas, same la bonvoluloj, en tiel kritika momento. Necesas do, bone malbone, organizi volontularon por helposervo. Tio estas ege malfacila meze de simila malordo, kiun komplikigas paniko, kies malbonega rezulto nur pliigas la konfuzon kaj pligravigas, pro la emocio, kiun ĝi kaŭzas, la mizeron de la vunditoj. »* (Fino de la citaĵo).

Henry Dunant do organizas volontularon. Sen ricevi ordonon, sen rajtigilo, li iras de preĝejo al preĝejo, de hospitalo al hospitalo, por kunordigi la laboron de la improvizitaj flegistoj kaj helpi la kuracistojn. Kiam malespero ekregas, li alportas novan kuraĝon, kie homoj mankas, li instruas simplajn sanitarajn praktikojn. Li tre atentis la sintenon de la flegistoj al la vunditoj de malamikaj armeoj. Tiurilate necesas citi tekston hodiaŭ klasikan :

*« La virinoj de Castiglione, skribis Henri Dunant, vidante, ke mi faris nenian diferencigon pri nacieco, sekvas mian ekzemplon kaj manifestas la saman bonvolon por tiuj homoj el tiel diversaj devenoj. « Tutti fratelli » (ĉiuj fratoj) ili ripetas kun emocio. Omaĝo al tiuj kompatemaj virinoj. »* (Fino de la citaĵo).

Preskaŭ cent paĝoj de *Rememoro de Solferino* rakontas la suferojn de la vunditoj, kiuj ofte ne mortis pro siaj vundoj, sed pro manko de kuracado. Kiam la situacio fariĝas preskaŭ senespera, Henry Dunant malobeas la dormosignalon kaj riskas sian vivon dum nokta veturado, kiu kondukas lin al la arme-estroj. Li rememorigas al ili la mizeron de la vunditaj soldatoj. En leteroj li vokas helpon de filantropaj ĝenevanoj. Tiuj leteroj subite diskonigas lian laboron kaj favoros la fondon en Ĝenevo mem de Ruĝa Kruco.

Nun ni iru kun Henry Dunant en malsanulejon : *« Sur la slabaro kuŝas flankon ĉe flanko francoj kaj araboj, germanoj kaj slavo. Kelkaj, kiujn oni provizore metis ĉe la fonon de kapeloj, ne plu trovas forton sin movi. Aliaj, pro lokmanko, ne povas moviĝi en la mallarĝa spaco, kiun ili okupas. Ĵuroj, blasfemoj kaj krioj nepriskribeble tondras sub la volvoj de la*

*sanktejoj. « Ha, sinjoro, kiom mi suferas ! diradas al mi tiuj malfeliĉuloj, oni forlasas nin, oni lasas nin morti mizere, ni tamen kuraĝe batalis ! » Malgraŭ siaj laciĝoj, malgraŭ noktoj de maldormo, la ripozon ili ne trovas, ĝi forlasas ilin. En sia mizerego ili petegas helpon de kuracisto, aŭ ili sin rulas pro malespero en konvulsioj, kiuj finiĝos per tetano kaj morto. » (Fino de la citaĵo).*

Henry Dunant diras en alia parto de sia verko : *« En tiuj multnombraj hospitaloj de Lombardio oni povas ekvidi kaj ekkompreni je kiu prezo sin aĉetas tio, kion la homoj pompe nomas gloron, kaj je kiu prezo pagiĝas tiu gloro ! »* (Fino de la citaĵo.)

Dum tiu prelego, kiel dum la pasinta, mi legis al vi plurajn tekstojn de Henry Dunant, ĉar ili formas veran fundamenton sur kiu kreiĝis iom post iom la movado Ruĝa Kruco. Dum tiu ĉi jaro en preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo ministroj celebros la centjarecon de Ruĝa Kruco. Bedaŭrinde nur malmultaj citos tekstojn el la fonto mem, kiu naskis la celebratan organizaĵon.

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri la centjareco de Ruĝa Kruco. Se vi deziras aŭdi la sekvontan prelegon pri tiu ĉi temo, ne forgesu kapti la elsendojn de Radio-Svislando.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-